

Heinrich Heine,  
Grabspruch

Wo wird einst des Wandermüden  
letzte Ruhestätte sein?  
Unter Palmen in dem Süden?  
Unter Linden an dem Rhein?

Werd´ ich wo in einer Wüste  
ingescharrt von fremder Hand?  
Oder ruh´ ich an der Küste  
eines Meeres in dem Sand?

Immerhin! Mich wird umgeben  
Gottes Himmel, dort wie hier,  
Und als Totenlampe schweben  
nachts die Sterne über mir.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).*

*MR-261-1c / Arg-63-122 (2003-10-26 01:05:12)*

Heinrich Heine,  
Tombosentenco

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kie estos ripozejo  
lasta de migranto mi?  
Ĉu sub palmoj en forejo?  
Aŭ ĉe l´ Rejno sub tili´?

Ĉu enfosos min malpie  
iu en dezerta land´?  
Aŭ ĉu mi ripozos ie  
en la sablo de marstrand´?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie  
la ĉiel´ de l´ granda Di´,  
steloj tie ĉi kaj tie  
lampe ŝvebos super mi.

*Traduko de la Germana poemo “Grabspruch” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1993.*

*MR-261-1c / Arg-63-123 (2010-05-26 19:44:33)*

Heinrich Heine,  
Kie, laca vagabondo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Kie, laca vagabondo,  
trafos mi al lasta hejm´?  
Ĉu sub suda palmofrondo?  
Sub tilio apud Rejn´?

Ĉu min en dezert´ enfosos  
haste ies fremda man´,  
aŭ en sablo mi ripozos  
borde de la ocean´?

Kie ajn! Min la ĉieloj  
brakos, kiel tie ĉi,  
kaj funebro-lampe steloj  
ŝvebos nokte super mi.

*Traduko de la Germana poemo “Grabspruch” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976).*

*Arg-63-1083 (2010-05-26 19:45:24)*